

Tekstoj de kantotaj kanzonoj dum la 13^a Meksika Esperanto-Kongreso



1a DOSIERO

Gravaĵoj!

- En ĉiu dosiero aperos tekstoj de kanzonoj esperantaj aŭ esperantigitaj, kiujn partoprenontoj de la 13a MEK povos kanti karaokee dum la kongreso.
- Unue vi trovos titolon kaj ĝeneralajn informojn de ĉiu kanzono, poste venas la teksto en esperanto, tiel, kiel aperos sur ekrano dum la aktiveco.
- Ofte je la fino aperas ligo al youtube paĝo, dependante de ĉiu kazo, vi trovos la esperantan version, la originalon aŭ nur muzikon de ĉiu kanzono, tiel ke vi familiariĝu kun la melodio.
- Bv. atenti ke, kion vi aŭdos ĉe youtube aŭ en povus NE havi la saman tekston kiel ĉi tiujn, tamen, kiel ni menciis, gravas ke vi praktiku tion, kio estas en ĉi dosiero ĉar tiel aperos la frazoj sur ekrano dumkongrese.
- Ĉiel la tekstojn kaj karaokeojn de tiuj dekunu kantaĵoj ni prenis de http://www.ophicinadigital.com/all/ak_kara.htm#2

1. AMU MIN PER TUTA KORO

Cuando calienta el sol

Komponis: C. Rigual kaj C. A. Martinoli,

Versio en Esperanto: Sergio Ducal

Latinamerika Kanto

Amu min petas mi Per tuta koro Amu min per tuta kor' Aŭ tute ne Kaj vi promesu ke Tuj min donos ĉiujn kisojn Ĉu dum vintro Ĉu somere ĉiam ajn Ĉu fore restas vi Aŭ tre apude Amu min per tuta kor' Kiel mi vin Ne nur vi amu min Dum momento aŭ dum horo Sed por ĉiam	Senhezite kiel nun... Per ĉiu bato de\ l' kor' Ĉu fore restas vi Aŭ tre apude Amu min per tuta kor' Kiel mi vin Ne nur vi amu min Dum ĉi momento Aŭ dum ĉi horo Sed por ĉiam Kaj senhezite Kiel nune... Per ĉiu bato de\ l' kor' Per ĉiu bato de\ l' kor' Per ĉiu bato de\ l' kor'
---	--

<http://www.youtube.com/watch?v=qtWZ-PWrenc>

2. DANKON AL LA VIVO

Gracias a la Vida

Komponis: Violeta Parra

Versio en Esperanto: Franko Luin

Latinamerika Kanto

<p>Dankon al la vivo, la riĉaĵdonanto Pro la du okuloj, kies vidkapablo Helpas min distingi nigron de la blanko Kaj la stelojn brilantajn en la ĉielalto Amatinon mian en la homamaso</p> <p>Dankon al la vivo, la riĉaĵdonanto Pro la du oreloj kies aŭdovasto Kaptas tag'-nokton, grilojn kaj birdkantojn Batojn kaj turbinojn, bojojn kaj pluvfalojn Kaj la voĉon mildan de la koramatin'</p> <p>Dankon al la vivo pro la voĉdonaco Kaj la literaro kiuj donis vortojn Al la pensimago, panjo, amiko, frato Kaj la luma pado kiun iras lante Kaj ĉiam sekvante la amatan paŝon</p>	<p>Dankon al la vivo, la riĉaĵdonanto Pro la longaj vojoj kaj la piedlaco Ili min kondukis al urboj kaj vilaĝoj Bordoj kaj dezertoj, valoj kaj montaroj Kaj al via domo, korto kaj loĝstrato</p> <p>Dankon al vi vivo, la riĉaĵdonanto Pro la kor' sentema al la homaj agoj Tremas ĝi vidante homajn cerbumaĵojn Tremas ĝi vidante la malbonovaston Tremas ĝi vidante vian okulklaron</p> <p>Dankon al la vivo, la riĉaĵdonanto Dankon al la vivo ĉiame Pro larmguto, ploro kaj ridet' Dankon al la vivo ĉiame Pro la am' de Di' por ĉiuj ni, ĉiuj ni</p>
---	---

<http://www.youtube.com/watch?v=e4xIeGKH0Z8>

3. GUANTANAMERA

Komponis: José Fernandes Días

Versio en Esperanto: José Martí kaj Pete Seeger

Kuba kanto

<p>Gŭantanamera Gŭajira Gŭantanamera Gŭantanamera Gŭajira Gŭantanamera</p> <p>De kie kreskas la palmoj Mi venas homo sincera De kie kreskas la palmoj Mi venas homo sincera Por kanti simplajn korkantojn Al nia mondo mizera</p> <p>Gŭantanamera Gŭajira Gŭantanamera Gŭantanamera Gŭajira Gŭantanamera</p> <p>La kantoj spiras helverdon Kaj spiras ardan brulruĝon kantoj spiras helverdon spiras ardan brulruĝon Kaj kiel cervo vundita En montoj serĉas rifuĝon</p>	<p>Gŭantanamera Gŭajira Gŭantanamera Gŭantanamera Gŭajira Gŭantanamera Gŭantanamera Gŭajira Gŭantanamera Gŭantanamera Gŭajira Gŭantanamera</p> <p>Mi disdividas la sorton Kun la mizera homaro Mi disdividas la sorton Kun la mizera homaro Ĉar tiu monta torento Ĝojigas min pli ol maro</p> <p>Gŭantanamera Gŭajira Gŭantanamera Gŭantanamera Gŭajira Gŭantanamera Gŭantanamera Gŭajira Gŭantanamera Gŭantanamera Gŭajira Gŭantanamera</p>
--	--

<http://www.youtube.com/watch?v=oHKsYvYEbD8>

4. HO! KAROL

Oh! Carol

Komponis: Howard Greenfield

Versio en Esperanto: Antonio Luís Lourenço dos Santos

Usona kanto

<p>Ho Karol Frenezigis mi ...i ...i Pro via amo Kion faris vi?</p> <p>Ho Karol Pro vi mi plori ...i ...is Se vi ignoris Certe mortos mi</p> <p>Karol ja ne volos mi alian Ĉar mi amas vi ...i ...in Estos vi ĉiam Mia amatin'</p>	<p>Am' estas tre bela emocio Plena de iluzio Ho Karol Mi elkore amas vin</p> <p>Karol ja ne volos mi alian Ĉar mi amas vi ...i ...in Estos vi ĉiam Mia amatin'</p> <p>Am' estas plej grava emocio Plena de iluzio Ho Karol Mi elkore amas vin</p>
---	---

<http://www.youtube.com/watch?v=NhAKhKE5djI>

5. IMAGU

Imagine

Komponis: John Lennon kaj Yoko Ono

Versio en Esperanto: Manuel Pancorbo

Angla kanto

<p>Imagu nin sen ĉiel' Facile provos vi Infer' nenie Nur steloj super ni</p> <p>Imagu ĉiujn homo... o... ojn Gajaj pro feliĉ' Ooh Ooh Ooh</p> <p>Imagu nin sen landoj Ne hezitu pro la pen' Neniu mortigenda Pro religia devo</p> <p>Imagu ĉiujn homo... o... ojn Vivaj kaj en pac' Oooh Oooh Oooh Oooh</p>	<p>Vi ja pensas min ia revulo Sed jam estas pluraj pli Esperas mi, ke vi aniĝu al ni Ek la mond' al unu... i... i... i... ĝo</p> <p>Imagu nin senmonaj Certe facila tasko Sen avarem' kaj malsato En fratsent' la homar' Imagu ĉiujn homo... o... ojn Pretaj por donad' Oooh Oooh Oooh Oooh Oooh</p> <p>Vi ja pensas min ia revulo Sed jam estas pluraj pli Esperas mi, ke vi aniĝu al ni Ek la mond', al unui... i... i... ĝo</p>
---	--

<http://www.youtube.com/watch?v=TvgRX9hLQ6I>

<http://www.youtube.com/watch?v=mYIoM5MmKAK>

6. KIEL FARTAS VI

Como Vai Você

Komponis: Antonio Marcos

Versio en Esperanto: Antonio Luís Lourenço dos Santos

Brazila kanto

<p>Kiel fartas vi Mi bezonas scii pri via vivo Mi vin petas rakonti pri via tago Ĝus noktiĝis kaj mi bezonas scii nur</p> <p>Kiel fartas vi Kiu malaperis ja el mia vivo Kial' de mia pac' jam forgesita Ju pli mi amas vin des malpli amas min</p> <p>Jen la amdezir' por vi fortigas min Mi volas mateniĝi ĉirkaŭ vi Penige la feliĉon serĉas mi Jen la tempo povas disigi nin du</p>	<p>Ne flanken lasu la valora viv' Mi bezonas scii nur Kiel fartas vi</p> <p>Kiel fartas vi Kiu malaperis ja el mia vivo Kial' de mia pac' jam forgesita Ju pli mi amas vin des malpli amas min</p> <p>Jen la amdezir' por vi fortigas min Mi volas mateniĝi ĉirkaŭ vi Penige la feliĉon serĉas mi</p> <p>Jen la tempo povas disigi nin du Ne flanken lasu la valora viv' Mi bezonas scii nur Kiel fartas vi</p>
---	---

<http://www.youtube.com/watch?v=jc1hSe1gvxM>

7. KISU MIN MULTE

Bésame Mucho

Komponis: Consuelo Velázquez

Versio en Esperanto: Franko Luin

Meksika kanto

<p>Kisu min kisu min multe Kiel se estus ĉi nokto la lasta por ni</p> <p>Kisu min kisu min ofte ĉiam timegas min perdi vin post tio ĉi</p> <p>Kisu min kisu min multe Kiel se estus ĉi nokto la lasta por ni</p> <p>Kisu min kisu min ofte ĉiam timegas min perdi vin post tio ĉi</p>	<p>Volas mi teni vin premege okul' ĉe la okulo kaj resti kun vi ĉiam</p> <p>Pensu ke eble frumatene mi devos ja foriri foriri tuj de vi</p> <p>Kisu min kisu min multe Kiel se estus ĉi nokto la lasta por ni</p> <p>Ĉiam timegas min perdi vin post tio ĉi</p>
---	---

<http://www.youtube.com/watch?v=AHZUf3tfZE8>

8. KNABINO EL IPANEMA

Garota de Ipanema

Komponis: Tom Jobim kaj Vinicius de Moraes

Versio en Esperanto: Aaron Köenig

Brazila Sambo

Vidu knabino belega\ iganta\ amema Jen ŝi reĝino de l' plaĝ' Ipanema Kun dolĉa luliĝo survoje\ al mar'	Kial min punas soleco? Ha, nekredebla beleco Belulin' kiu ne estas mia Sola sed tiom gracia
Ino de korp' origita de l' sun' de\ Ipanema Kun paŝo sambeca ŝajnante poema Kaj se ŝi koksumas mi ĝemas nur: Aahh!...	Ho, se ŝi nur sciintus ke kiam ŝi venas La mondo\ entute je gracia plenas Kaj iĝas pli bela pro kaŭzo de\ amor' Pro kaŭzo de amor'
Mi rigardas ŝin triste...	

http://www.youtube.com/watch?v=gouAIO8gx_w

9. KUN VI MI LERNIS

Contigo Aprendí

Komponis: Armando Manzanero

Versio en Esperanto: Wellington C. Rocha

Meksika kanto

Kun vi lernis mi Ke ekzistas novaj kaj pli bonaj emocioj Kun vi lernis mi Esplori mondon tute plenan de iluzioj Lernis mi Ke la semajnoj estas pli ol nur septagaj Igi l' maloftajn ĝojojn miajn pleje grandaj Ege bonŝanci ankaŭ lernis mi kun vi Kun vi lernis mi Malkovri l' lumon trans la luna alia flanko Kun vi lernis mi Ke via esto apud mi nepras sen manko Lernis mi Ke povas kis' iĝi pli dolĉa pli profunda Ke tut-egalas se mi tuj lasos tiun ĉi mondon	Jam la ĝuindojn ĉiajn kune spertis ni Kaj mi lernis ĉe vi Ke mi naskiĝis kiam vin renkontis mi Kun vi lernis mi Malkovri l' lumon trans la luna alia flanko Kun vi lernis mi Ke via esto apud mi nepras sen manko Lernis mi Ke povas kis' iĝi pli dolĉa pli profunda Ke tut-egalas se mi tuj lasos tiun ĉi mondon Jam la ĝuindojn ĉiajn kune spertis ni Kaj mi lernis ĉe vi Ke mi naskiĝis kiam vin renkontis mi Kaj mi lernis ĉe vi ke Mi naskiĝis kiam vin renkontis mi
---	---

<http://www.youtube.com/watch?v=tI9y97AOTvk>

10. NURE VI

Only You

Komponis: Ram kaj Rand

Versio en Esperanto: António Martins

Usona kanto

<p>Nure vi ĉi mondon igas bel' Nu...u...re vi...i...i lumigas el malhel'</p> <p>Nure vi kaj sole vi min trafas ĉe la kor...o plenigante ĝin ja nure vi ...i ...i</p> <p>Nu ...u ...u ...re vi kapablas ŝanĝi min ĉar al mi ...i ...i ...i vin portis la destin'</p>	<p>Kiam man' en man' en akompan' ni dronas en ma ...a gi' Realiginta rev' vi sole nure vi</p> <p>Nu ...u ...u ...re vi kapablas ŝanĝi min ĉar al mi ...i ...i ...i vin portis la destin'</p> <p>Kiam man' en ma ...an' en akompa ...a ...an' ni dronas en magi' Realiginta rev' vi sole nure vi</p>
---	---

<http://www.youtube.com/watch?v=Lw7arbUVbHo>

11. RANĈO GRANDA

El Rancho Grande

Versio en Esperanto: Tradukinto nekonata

Meksika popolkanto

<p>Ho! vivis mi vakere Ĉe unu ranĉo granda Kaj ranĉulino gaje Konsilis min dirante Konsilis min dirante Bezonos vi pantalonon Ĝin faros mi laŭvakere El drapo kudros la zonon El ledro stebos cetere Vi ne fidu promeson</p>	<p>Ankaŭ ne fidu amon Se vi neos la jesojn Vi sentos la doloron Vi sentos la doloron Bezonos vi pantalonon ho! ho! Ĝin faros mi laŭvakere ho! ho! El drapo kudros la zonon ho! ho! El ledro stebos cetere Ho! vivis mi vakere Ĉe unu ranĉo granda ...</p>
--	---

<http://www.youtube.com/watch?v=f4ecjq6mKsU>

<http://www.youtube.com/watch?v=mcywDQIFAjY>